Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

M. 15173 : 1.

(översättn. 2 sidor)

U. S. A.

uppt. år 1952

Svar å LUF 85 rör. hästkött och hästslakt m. m.

s. 1

(9) ust M. 15173:1
FOLKLIVSARKIV
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

Responde al via enketo pri la uzo de ĉevalviando en Usono:

I Kvankam oni scias, ke la viando de sana ĉevalo estas same nutra kaj ofte vendebla je eble nur triono de la nuna kosto de aliaj viandoj, en Usono oni neniam ĝin ĝenerale uzis.

Ekzistas en ĉiu grandurbo unu aŭ kelkaj vendejoj por ĉevalviando por homa nutraĵo (tiuj vendejoj ne rajtas vendi aliajn viandojn), kaj la Usona registaro kontrolas sufiĉe grandan nombron da buĉejoj por ĉevaloj. Antaŭnelonge okazis en Chicago skandalo pro la miksado de ĉevalviando kun bovaĵo en la provizoj liverataj al grandaj restoracioj. Tio montras bone la publikan sintenon rilate ĉevalaĵon. Kiam la kostoj de bovaĵoj atingis tre altajn nivelojn dum kaj post la milito, pli kaj pli da personoj sin turnis al la ĉevalo por havi egalan nutraĵon je minimuma kosto.

2 Kiel mi diris, la mortigo de ĉevaloj por homa nutraĵo estas rekonata, se malgranda, industrio, ligata kun nenia sociala malhonoro. Ekzistas, kompreneble, leĝoj kontraŭ la venenigo de hundoj aŭ katoj aŭ aliaj dorlot-bestoj. Se iu faras tion li estas krimulo, punota laŭ la leĝoj de la diversaj ŝtatoj. Mi ne scias, ĉu via demando iel koncernas la uzon de tiuj kiel nutraĵo, sed mi ne supozas ke la nombro de tiaj bestoj tiel utiligataj povas esti granda.

En la ŝtatoj de Sud-okcidenta Usono ekzistas grandaj aroj da sovaĝaj ĉevaloj kaj azenetoj. Ĉar iliaj nombroj trokreskas proporcie al la uzebla paŝtejo, la ŝtataj registaroj regule mortigas grandajn nombrojn, kompreneble sub severa kontrolo. Oni ankaŭ devas malpliigi regule la nombrojn da cervoj, pro la sama kaŭzo. La rezultanta viando, peltoj, ktp, estas liverataj al kontrolataj buĉejoj por preparo, aŭ kiel homa aŭ besta nutraĵo, kaj al ledfabrikoj.

Tra tuta Usono ekzistas granda nombro da farmoj kie oni bredas vulpojn kaj lutreolojn por la peltoj. Tiuj uzas ĉefe ĉevalviandon kaj la industrio konsumas milojn da ĉevaloj ĉiujare por tiu celo.

3 Krom la kontrolitaj de la registaro buĉejoj, ekzistas ankoraŭ pli granda nombro da aliaj. La produktoj de tiuj lastaj estas libere vendataj por besta nutraĵo nur, kaj devas anonci ke iliaj varoj estas "Not Inspected." Ilia produkto estas uzata ĉefe por la pelt-farmoj, kvankam, en iu grandurbo, ekzistas ankaŭ centoj da vendejoj por "pet-food" (nutraĵo por dorlot-bestoj, precipe katoj kaj hundoj.) La prezo estas nun ĉirkaŭ 25¢ po funto por la uzeblaj partoj. La "krom-produktoj" estas kredeble traktataj same kiel en bov-buĉejo, por industriaj celoj.

4 Por la dispono de malsanaj aŭ troaĝaj dombestoj ekzistas la urbaj instituciој por perditaj aŭ nedezirataj bestoj. Oni pagas malgrandan sumon por ilin humane mortigi, kiel oni ankaŭ faras kun la superfluaj nedezirataj bestetoj. Kloroformo aŭ io simila estas precipe uzata, en gazĉambro.

En la oficialaj, aprobitaj buĉejoj de ĉiuj specoj, oni unue sensentigas la beston per martela frapo. Oni eksperimentis kun elektraj marteloj kaj aliaj aparatoj, sed ŝajne la simpla martelo estas ĝenerale uzata.

D. E. PARRISH,
328 West 46th Street
Los Angeles 37, California

USA

M. 15173.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

(9)

Svar på Eder rundfråga angående användningen av hästkött i Förenta Staterna:

1. Fastän man vet att köttet hos en frisk häst är lika närande och ofta till salu för kanske endast en tredjedel av det nuvarande priset på andra köttslag, så har man aldrig använt det allmänt i Förenta Staterna.
Det finns i varje större stad en eller flera butiker för hästkött till människoföda ( dessa butiker har ej rätt att saluföra andra köttslag), och amerikanska regeringen kontrollerar ett ganska stort antal butiker för hästkött. Nyligen förekom i Chicago en skandal på grund av att hästkött blivit förväxlat med oxkött i de varor som levererades till stora restauranter. Detta visar klart allmänhetens inställning till hästkött. När priserna på oxkött steg mycket kraftigt under och efter kriget, gick folk mer och mer över till hästkött för att på så vis få en likvärdig kost till minimalt pris.

2. Som jag tidigare sagt, är dödandet av hästar till människoföda en erkänd sysselsättning (även om det förekommer endast i liten utsträckning). Denna sysselsättning är ej förbunden med någon social vanheder. Det finns givetvis lagar mot förgiftande av hundar eller kattor eller andra sällskapsdjur. Om någon förfar på det sättet är han en brottsling, förfallen till straff enligt de olika staternas lagar. Jag vet inte om Eder fråga även omfattar användandet av dessa djur som föda, men jag förmodar att antalet sådana djur som användas härtill ej är stort.
I sydvästra delen av Förenta Staterna finns stora mängder vilda hästar och vildåsnor. Då deras antal växer för fort i förhållande till betestillgången, dödar delstatsregeringarna regelbundet stora massor, naturligtvis under sträng kontroll. Likaledes måste man regelbundet förminska antalet hjortar av samma skäl. Det kött och de hudar man får härav levereras till kontrollerade slakthus för beredning, antingen till människo- eller djurföda, och till läderfabrikerna.
Över hela Förenta Staterna finns det ett stort antal farmer där man föder upp rävar och minkar för pälsarnas skull. Dessa äter huvudsakligen hästkött och industrin använder tusentals hästar årligen för detta ändamål.

3. Förutom de statskontrollerade slakthusen, finns det ytterligare ett stort antal andra. Produkterna från dessa sista säljas fritt men enbart till djurföda, och de måste påstämpla sina varor "Not inspected". Deras produkter är huvudsakligen använda för pälsfarmerna, ehuru det förekommer i någon storstad hundratals butiker för "pet-food" (föda för sällskapsdjur, i synnerhet kattor och hundar.) Priset är nu c:a 25 ¢ per pund för de användbara delarna. "Biprodukterna" behandlas troligtvis på samma sätt som i slakthusen för nötboskap, till industriella ändamål.

M. 15173.

4. Till sjuka och för gamla husdjurs förfogande står stadsanstalterna för hemlösa eller ej önskvärda djur. Man betalar en liten summa för att få dem humant avlivade, liksom man också gör med överflödiga ej önskvärda smådjur. Kloroform eller något liknande användes i synnerhet, i gaskammare.
I officiellt erkända slakterier av alla slag bedövar man först djuret genom ett hammarslag. Man har försökt med elektriska hammare och andra apparater, men tydligen är den enkla hammaren i allmänt bruk.

D. E. PARRISH

LEK/TB